

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO I^a : NOVEMBRO-DECEMBRO 1921

11-12

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

Gvidlibro de Girona

VERKITA DE JOSEP MARIA DALMAU

K A J

ELDONITA DE «ĜERONA ESPERO»

OKAZE DE LA

IX^a KONGRESO DE «KATALUNA

ESPERANTISTA FEDERACIO»

Kun belegaj gravuraĵoj kaj detala arĥeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Ĉiuspecaj sciigoj.

PREZO : 1 peseto.

ESPERANTO TRIUMFONTA

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

“L'ESPERANTO”

MONATA ILUSTRITA

INTERNACIA REVUO

sub patronado de

«ITALA KATEDRO DE ESPERANTO»

Abono : 15 lirojn

Adreso:

S. VITO AL TAGLIAMENTO

(Italujo)



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redaktoro: **Jaume Grau Casas**

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.

LINTERESPLENE atendis la Girona urbo la okazon de nia Kongreso, post tiom da tempo de ĉiuspekaj propagandoj pri Esperanto. De antaŭ longe loĝadas tie multaj aŭstraj geinfanoj pli-malpli bone parolantaj nian lingvon, sed venigitaj tien de Esperantismo kaj montrantaj ĝin al ĉiuj; la loka ĵurnalaro helpadis fervore la disvastigon de nia ideo kaj aperigis lastmomente du ĉefajn artikolojn kun varmoplena saluto al la Kongreso; la du Gironaj grupoj senĉese kaj firme laboradis; al ĉio ĉi certe ni ŝuldas la koran akcepton de la urbo al la esperantistoj, rigardataj de la enurbanoj kun videbla simpatio.

SABATO, 15

ALVENO DE LA KONGRESANOJ

Je la alveturo de la oficiala vagonaro, estis atendantaj la Kongresanojn la aŭtoritatoj, akompanataj de la urba samideanaro

kaj granda popolamaso en kiu svarmis la standardoj de la lokaj societoj, kaj la muzikistaro de la Regimento de Asia ludis salutantan marŝon, dum ĉiuj alvenintoj forlasis la vagonojn kaj la verdaj standardoj de niaj Grupoj estis aplaŭdataj meze de ĝenerala ĝojo kaj brua entuziasmo.

Oni aliris en impona demonstracio al la Urbdomo, traitante solene la ĉefajn stratojn kie ĉiuj Gironanoj surprize ekvidis kaj rigardadis bonvene la esperantistan popolon.

Ĉe la stratoj oni povis vidi grandajn murafiŝojn anoncantajn la Kongresajn festojn; meze de la placo de la Konstitucio pendis grandega flago esperantista; tie la muzikistaro ludis la esperantan himnon kaj oni eniris en la Urbdomon.

AKCEPTO ĈE LA URBDOMO

En la granda kaj belega salono, la Vic-Urbestro S-ro Rahola salutis la Kongresanojn, esprimante sian opinion ke la enkonduko de internacia lingvo estos la sola solvo al multaj malfacilaj problemoj, kaj oferis la helpon de la Urbkonsilantaro al la esperanta movado.

Nome de «Kataluna Esperantista Federacio» respondis al la Urbestro S-ro Jaume Grau, Redaktoro de K. E., dankante liajn favorajn vortojn kaj salutante la urbon kiu tiel gastame nin akceptis kaj tiel aktive partoprenas en nia idealo.

Fine parolis la Provincestro, S-ro Fleta, kiu ankaŭ diris kuraĝigajn frazojn al la esperantistoj.

Meze de adiaŭa kaj danka aplaŭdado, forlasis la salonon la Urbestro, la Provincestro, la Generalo, militista ĉefo de la urbo, kaj aliaj aŭtoritatuloj kiuj honoris la Kongreson per sia ĉeesto.

MALFERMA KUNSIDO

Pastro Josep Casanovas, Prezidanto de la Kongresa Komitato, diris kelkajn elokventajn vortojn de ĝojo pro la delonge atendata okazo de kataluna Kongreso en Girona kaj, malfermante

nian solenan jarkunvenon, transdonis la parolon al S-ro Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio».

Jen la Prezidanta parolado:

«Karaj gefederacianoj!

Jen por la unua fojo en mia esperanta vivo, mi ekstaras antaŭ vi por plenumi kutiman devon de la prezidantoj de nia kara Federacio.

Mi ne volas kaŝi al vi kiom multe mi estis devigata streĉi mian cerbon ĝis ĝi elŝprucis la nun legotajn liniojn. Mi petas vian pardonon se ili ne estas tiel indaj je vi kiel vi ja meritas.

Jen mi venas malfermi la IX-an Kongreson de la «Kataluna Esperantista Federacio», kun ĝojo en la koro, kun tiu ĝojo kiu donas la trankvileco esti plenuminta sian devon... Ke ĉiuj sonoriloj sonadu al plej granda festo! Ke ĉiuj koroj entuziasmiĝu al tiu sama sono!

Jam de longe mi revadis al tiu ĉi festo kaj nun mi vidas tiujn revojn efektivigitaj; imagu do kial mi venis ĉi tien kontenta kaj gaja: kontenta pro la atingitaj rezultatoj, gaja ĉar denove mi vidas inter ni preskaŭ ĉiujn pionirojn de nia movado, tiujn al kiuj ni ŝuldas la tradicion, la entuziasmon, la vojon kiun ni laŭeble sekvis. Honoron kaj dankon al vi!

Ankaŭ publike mi volas kore danki miajn kunlaborantojn ĉe la Direkta Komitato; ili tiom multe helpis, ke la peza tasko reorganizati nian superan organizaĵon estis malgrandigata pro ĉies laboremo.

Plie, al vi karaj geamikoj kaj federacianoj, mi ŝuldas ankaŭ koran dankon pro via sintenado, pro via tuja aliĝo al nia «Kataluna Esperantista Federacio», pro via pli-malpli kaŝita helpemo, kiuj ebligis al ni denove meti nian ĉefan ligilon preskaŭ en la sama loko kie ĝi antaŭe estis.

Fine, mi volas esprimi speciale mian dankemecon al la Grupo «Ĝerona Espero» kiu, akceptinte la gravan kaj malfacilan taskon organizi la nun malfermatan Kongreson, pruvis la entuziasmo kiun ĝi havas kaj volis partopreni tiel efike al la plena revigligo de nia kataluna movado.

Mi ne volas paroli pri la tasko farita de la nuna estraro de K. E. F.; vi ĉiuj certe sekvis niajn paŝojn kaj via apogo dum la ĵus pasinta jaro pruvis al ni ke ni iris sur la bona vojo. Aliflanke nia Sekretario legos la raporton de niaj taskoj kaj vi juĝos ilin.

Nur mi volas pritrakti du spertitajn faktojn:

Se la atingitaj rezultatoj de nia unujara laborado estas sufiĉe kontentigaj ni ne dormu sur la laŭroj! Nia apostola posteno en nia movado nepre devigas nin ĉiam, ĉiel kaj ĉie laboradi, ĉar nur: post longa laboro, ni atingos la celon en gloro!

Ĉefa punkto estas, por ke nia Federacio havu plej gravan forton, senĉese varbi novajn federacianojn. Tuj post la dissendado de nia alvoko ni ricevis sufiĉan kvanton da aliĝoj, kaj mi diras sufiĉan kvanton, ĉar mi konsideras ke multaj katalunaj samideanoj skeptike vidis niajn unuajn

laborojn kaj eĉ kelkaj esprimis al ni vortojn kapablajn malkuraĝigi plej energiajn personojn, se tiuj ĉi ne estus sentintaj kiel ni la forton, la devon, la entuziasmon por nia sankta afero, se tiuj, kiuj frapis ĉiujn pordojn, ne estus konintaj la vortojn de la Majstro: «eĉ guto malgranda konstante frapante, traboras la monton granitan». Nia obstina penado sukcesis kaj ni atingis la aliĝon de 400 anoj. Sed, diru al mi: ĉu vi kredas ke en nia lando nur estas 400 samideanoj? Ĉu vi ne pensas ke se ĉiuj konus sian devon ni povus atingi la numeron du mil? Imagu la forton, la potencon de nia Federacio se ni iam atingus tiun vere ne grandan nombron! Kaj, ĉu tio ne estas ebla? Jes, mi estas certa pri tio; kaj mi dezirus ke ĉiuj prenu sur sin la taskon varbi, konvinki, anigi al K. E. F. ĉiujn amikojn esperantistajn aŭ esperantemajn.

Pensu ke ĉiu nova ano signifas novan forton, novan klopodon, novan pensmanieron, kaj ke kaŝitaj tiuj fortoj, tiuj klopodoj, tiuj pensmanieroj, ili ne utilas al nia afero kaj tamen certe povus esti gravaj iloj se oni ilin utiligus.

Ni bezonas ĉiam aron da sindonemaj samideanoj, nelacigeblaj, pretaj labori, ni devas ja pensi ke ĉiam la samaj personoj ne povas agi, ke ĉiuj rajtas kaj devas helpi subteni nian verdan standardon kaj nian «Katalunan Esperantistan Federacion».

Alia punkto pri kiu mi volas nun aludi estas la financa:

Kiam la nuna estraro de K. E. F., elektita la 10-an de oktobro 1920^a, prenis sur sin la malfacilan taskon revivigi nian dormetantan organismon, ĝi trovis aron da sindonemaj samideanoj, kiuj, plene fidantaj al ni, subskribis ĝis 550 pesetoj por la Kapitalo de K. E. F. Al ĉiuj ni ŝuldas plej koran dankon.

Per tiu mono estis al ni eble fari la unuajn laborojn kaj ni povis ekpaŝi sur la antaŭfiksita vojo kondukinta nin al la nuna sufiĉe bona stato.

La bilanco publikigita estas sendube kontentiga, sed ne tiel multe kiel ni rajtis esperi. Ĉirkaŭ 50 federacianoj ankoraŭ ne pagis sian kotizaĵon, kaj jen tiu fakto instigis min fari varman rekomendon al vi, por eviti tion en la estonteco.

Mi deziras ke ĉiuj bone pripensu la urĝan necesecon pagi ĉiam kiel eble plej akurate. Se vi tiel agas, la komitatoj de K. E. F. multe vin dankos kaj vi certe faciligos la taskojn. Konsideru ke se dum la unuaj monatoj de ĉiu jaro vi pagas la jarkotizon, estos eble fari la necesan budĝeton, nuntempe afero tute neebla ĉar oni ne povas kalkuli monon se oni ne estas ĝin ricevinta. Ne akurate pagi, vere malhelpas, kaj mi dubas ke iu federaci-ano volas malhelpi!

Samideanoj, ke la taskoj de la IX^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio» estu brilaj steloj alkondukantaj nin ĝis la fina triumfo!

JOAN GILI NORTA

Je la fino aŭdiĝis ĝenerala aplaŭdo kaj poste komenciĝis la salutado de la jenaj delegitoj, kiuj faris belajn paroladetojn dezirante sukceson al la Kongreso.

S-roj Joan Campdelacreu el «Esperantista Amikeco», Manlleu; R. Casas el «Aplec Esperanta Grupo», Sabadell; Marian Solà el «Lumon», Terrassa; Artur Domènech el «Barcelona Stelo», Barcelona; Jaume Bolós el «Nova Sento», Barcelona; Ferràn Bohigas el «Paco kaj Amo», Barcelona; J. Castells el «Esperantaj Kantistoj», Barcelona; Conrad Domènech el «Regeneracio», Salt; G. Boris el «Ĝerona Espero», Girona; J. Font el «Studenta Juneco», Girona; Jaume Grau el «Semo», Barcelona; J. Armengol el «Empordana Ebenajo», Armentera; J. Perich el «Esperanta Idealo», Santa Coloma de Farnés; J. Albagés el «Bela Espero», Manresa; P. Costa el «Ĝeronprovinca Esperantista Ligo»; Pere Domènech nome de la esperantistoj el Vilassar de Mar; Pastro Viver, el la Dimanĉa Lernejo de Torroella de Montgrí; Pastro Planas nome de la esperantistoj el Ripollet; Heinrich Günter, nome de la aŭstraj infanoj; S-ro Hudson, nome de la «Aŭstralia Esperanta Federacio».

El la salutaj paroladoj distingiĝis tiuj de S-ro Solà, kiu konstatis kun ĝojo ke nia Federacio trovis ĉiam en krizaj momentoj la ĝustajn homojn por la ĝustaj lokoj; Pastro Viver, kiu ĉeestis la Kongreson akompanata de kelkaj infanoj el Torroella kaj sin esprimis kun granda fervoro; junulo Günter, kiun ni povus nomi pioniro de «niaj» aŭstraj infanoj; kaj S-ro Hudson, aŭstralia samideano kiu vojaĝante tra Eŭropo venis honorigi nian Kongreson kaj nun, denove forveturinte, lasis en nia lando multajn geamikojn.

Fine oni emocie kantis «La Espero»n.

INAUGURO DE LA EKSPOZICIO

Oni supreniris al la unua etaĝo de la Urbdomo, kie, en du bele ornamitaj salonoj, estis instalata la Esperanta Ekspozicio, plej

konvinka pruvo de la disvastiĝo de Esperanto. Post la vizito de la Kongresanoj ĝi estis malfermata al la publiko.

Ĝi estis publike vizitebla dum tri semajnoj kaj certe la nombro de vizitantoj estis tre grava. Havigis la materialon por la Ekspozicio samideanoj el la tuta Katalunujo.

DISDONADO DE GVIDLIBROJ

Je la eliro el la Ekspozicio, estis disdonata al ĉiuj Kongresanoj la bela Gvidlibro de Girona, lerte verkita de la enurba samideano Josep Maria Dalmau kaj eldonita de la Grupo «Ĝirona Espero», okaze de la Kongreso. Per ĝi oni povas sciigi tre detale pri la multnombraj arĥeologiaj vidindaĵoj de la urbo.

La Kongresanoj dankis unuanime la delikatan donacon.

KONCERTO

Post la vespermanĝo, ĉe «Teatre Principal», okazis la Koncerto dediĉata al la Kongresanoj. Multaj verdstelanoj ĉeestis ĝin kaj admiris la arton de la «Trio Barcelona», kiun konsistigas la eminentaj muzikistoj Perelló (violono), Marés (violonĉelo) kaj Vives (piano).

DIMANĈO, 16

ESPERANTA DISERVO

En la antikvega romarta preĝejo de «Sant Pere de Galligans», unu el la arĥeologiaj juveloj de la urbo, okazis je la 8^a matene la solena Diservo, ĉeestata de preskaŭ ĉiuj Kongresanoj. Partoprenis ĝin niaj estimataj samideanoj Pastroj Josep Casanovas, el Girona, Josep Planas, el Ripollet kaj Francesc Viver, el Torroella de Montgrí. Tiu lasta predikis esperante tre bele kaj korekte. Dum la diservo, la Schola Cantorum de la Seminario kantis latine kaj esperante. Poste, oni benis novan standardon de la Grupo «Studenta Juneco», kiu disdonis belan rememorigilon pri tiu religia

esperanta festo. Hazarde la liturgia koloro estis en tiu tago verda.

Elirinte el la preĝejo oni vizitis la apudan Arĥeologian Muzeon. Dum tiu vizito alvenis ankoraŭ multaj aliaj samideanoj el Barcelona, kiuj nur dimanĉe povis ĉeesti la Kongreson.

LABORA KUNSIDO

En la bela kaj nova konstruaĵo «Grup Escolar», okazis je la 10^a la Labora Kunsido, ĉeestata de ĉiuj Kongresanoj (250 proksimume).

Prezidanto S-ro Gili Norta donis la parolon al Sekretario S-ro Alberich, kiu legis la jenan raporton :

Gefederacianoj: Jen ni troviĝas antaŭ vi post unu jaro de tiu tago, kiam kunvokitaj per la lasta numero de Oficiala Bulteno de K. E. F., ni kunsidis en Barcelona, unuj kun timo ke Federacio ne povas libere vivi en Katalunujo kaj oni devas forlasi tiun intencon; aliaj tute kontraŭe, kun plej granda optimismo kaj fido en la estonto kaj aliaj, novaj en la federacia kampo, kun deziro helpi laŭpove la reorganizon de K. E. F.

Hodiaŭ ni povas konstati kun ĝojo, ke tiu feliĉa tago trafe elektis la ĝustan vojon por la reorganizo de nia movado en Katalunujo, kaj pruvo pri tio estas la multaj venkoj atingitaj en diversaj lokoj kaj ke en la mallonga daŭro de unu jaro venis al niaj vicoj kvarcent samideanoj.

La hodiaŭna komitato de K. E. F., tuj post la elekto, sin turnis al ĉiuj Barcelonaj grupoj etendante amikan manon kaj petante ĉies kunlaboron por efike antaŭenpuŝi nian aferon. Ni atingis sincerajn respondojn de unuj kaj nekunligeblajn vidpunktojn de aliaj, kaj ni ne dirus nian tutan penson se ni ne raportus skize pri fakto, kiu pruvas ĝis kia grado ni deziris kaj deziras plenan unuecon. Mi volas aludi la Barcelonan Esperantan Societon, antaŭe Esperantanaro Fajro, kiu respondis al nia cirkulero dirante ke ĝi ne povas aliĝi al nia organizaĵo pro la eksigo, kiun oni interkonsentis pri ĝi en la kongreso de Sant Feliu de Guixols. Ni kontraŭargumentis, ke tio devas esti en forgeso unuflanke kaj ke aliflanke nun ne ekzistas la eksigita grupo, sed la nova B. E. S., kiu senhezite povas eniri niajn vicojn, se ĝi sincere deziras plenan unuecon. Sed vane ni parolis kaj klopodis ebenigi krutaĵojn: tiu societo, kiu bedaŭrinde staras kvazaŭ malamiko, postulis, ke oficiale dum kongreso oni nuligu eksigon de grupo, kiu ne ekzistas, por poste interkonsenti pri la cetero.

Mi citas tiun paĝon el nia unuajara reagado por ke vi ĉiuj konu, kion ni faris por eviti malkomprenojn kaj la duecon ekzistantan inter nia komuna organizaĵo kaj privata societo.

Nia komitato jam de la komenco ne havis apud si la valoran helpon de S-roj Josep Serrat kaj J. Vilaseca, kiuj pro privataj aferoj ne povis plenu-

mi la rolojn al ili konfiditajn en nia lasta ĝenerala kunsido. Tamen ni ne malesperis kaj jam antaŭ la reapero de «Kataluna Esperantisto» ni estis vizitintaj multajn samideanojn en plej diversaj urbetoj kaj vilaĝoj katalunaj, svingante la verdan flagon kaj alportante al ĉiu novan kuragojn kaj instigon helpi nian entreprenon. Ni vizitis la grupojn de Tarragona, Reus, Vendrell, Molins de Rei, Vilanova i Geltrú, Terrassa, Sabadell, Mataró, Ripollet, Girona, Palafrugell, St. Feliu, Sta. Coloma, Armentera kaj Salt.

Ni ne laboris senfrukte, ni ne trovis ĉie silenton kaj mallumon; aliĝoj kaj kuragiĝoj venis el plej diversaj lokoj kaj jen la unua numero de K. E., kvazaŭ sunradio de tagiĝo, eklumigis la tutan katalunan samideanaron samtempe kun la unua tago de la kuranta jaro.

Estas superflue diri, ke la koro de K. E. F. estas ĝia presorgano kaj sekve ĝi komencis vivi nur kiam K. E. regule salutis ĉiumonate siajn legantojn, kiuj ŝajne el ĝi eltrias forton kaj viklecon por daŭrigi entuziasme sian laboron kontraŭ la skeptiko kaj antaŭjuĝo sufiĉe grandkvante ankoraŭ ĉirkaŭanta nian movadon.

Pro tio, kun plena konscio pri kiel signifa estas nia organo, ni klopodis fari ĝin kiel eble plej interesa kaj riĉenhava. Dum la unua sesmonato ĝi estis dek-dupaĝa, de post Julio ĝi estas dek-sespaĝa kaj ni esperas ke plej proksiman jaron, se ĉiu el vi helpos en la varbado de novaj federacianoj, ĝi povos fariĝi dudekpaĝa.

Tre atentinda estas la sukceso, kiun ni atingis ĉe la 2^a Specimena Foiro okazinta en Barcelona. Sur paĝoj de K. E. vi legis, ke ties komitato akceptis Esperanton kaj ke ne nur ĝi diskonigis sian foiron tiulingve en fremdlando pere de folioj kaj afiŝoj sed ke ĝi konsentis dissendi reklamilojn por nia lingvo, speciale presitajn de ni. Krom tio ĝi komisiis nian prezidanton, okaze de la XIII^a en Praha, elekti reprezentantojn en diversaj landoj kaj rekomendis, ke tiuj ĉi konu Esperanton por plifaciligu la rilatojn.

Parolante pri la XIII^a, ni devas bedaŭri, ke la oficiala reprezentanto de Hispanujo ne permesis al nia delegito saluti la kongreson en la nomo de la katalunlingvanoj, kiuj havas sian reprezenton en la Lingva Komitato kaj estas sufiĉe konataj en la esperantista kampo.

Ni reorganizis la Konsultan Komitaton, kiu diversfoje kunsidis liverante al ni utilajn konsilojn, pri kiuj ni petis ĝin, kaj ni okazigis kun sufiĉe kontentiga rezultato ekzamenojn, kaj kiel preparan kurson de tiuj ekzamenoj tri el niaj fervoraj kunbatalantoj disvolvis interesajn temojn.

Antaŭ la apero de K. E. ni skribis al nia kunfrato Aragona Esperantista Federacio kaj al la subkomitato, kiu funkciis en Barcelona, proponante nian kunlaboradon kaj la kolonojn de K. E. por sukcesigi kaj propagandi la Duan Diskutan Kunvenon de Esperantistoj de Iberiaj Landoj okazintan en Zaragoza. Kvankam iafaje oni diris, ke nia organizaĵo fosis sub la organizantoj por fari tiun Kunvenon malsukcesa, ni povas certigi ke laŭpove kaj laŭeble K. E. F. klopodis diskonigi ĝin kaj ĉiel instigis la esperantistojn en Katalunujo multope alveturi la urbon de la Kunveno, pri kies celo

t. e. organizo de Konfederacio, ni ankaŭ ne restis senagaj. Kvankam ni konscias ke konfederacio ne povas ekzisti dum la Federacioj en Iberio ne havas sufiĉan vivopovon, ni ja ne voĉis senkuraĝigi la organizantojn kaj ellaboris projekton, kiun sankciis ĉiuj katalunaj grupoj. Pri la disvolviĝo de la Kunveno mem vi sendube jam sciigis per la raporto aperinta sur nia organo kaj mi ne devas vin ĝeni per ties ripeto.

Kun sukceso ni disvendis ĉiujn ekzemplerojn de Kataluna Poŝvortareto, kiuj restis ĉe presejo Tobella; ni eldonis novajn katalunajn ŝlosilojn, kiuj elĉerpigis unu monaton post la apero, pro tio ke ni ne eraris pri ties taŭgeco por la disvastigado de nia afero, kaj tiel ni ankaŭ povus raporti pri multaj aliaj sufiĉe gravaj aferoj, kiujn mi ne priskribas tial ke nia gazeto tion faris siatempe.

Sed ni ne devas silenti pri la malavareco pruvida de multaj samideanoj, kiuj malfermis sian poŝon por ebligi la reorganizon de K. E. F. Al tio ni multe ŝuldas, ke ni povis sentime travivi la unuan jaron sen malhelpoj financaj, kiujn ni estus suferintaj aliokaze. Nun ni jam faris la plej danĝeran paŝon, t. e. la unuan kaj ĝi pruvis, ke ni estas sur bona vojo. La plua progresado kaj disvolviĝado de K. E. F. estas certa kaj ni ne devas timi pri ĝia malapero. La ŝipo iom post iom pli facile fluos puŝata de favora vento, kiun naskas via fervoro kaj entuziasmo. La rikolto de nia semado estos des pli abunda, ju pli la tempo pasos. Ni ne mallevu la velojn, ni estu obstinaj en la batalado kontraŭ skeptiko kaj rutino de la homoj, kaj ni alportos al la granda tutmonda familio la bonon kaj belon de nia idealo.

Diversfoje ni diris, ke Kataluna Esperantista Federacio estas ĉies kaj ni devas tion ĉi ripeti antaŭ vi ĉiuj por ke vi vin sentu kiel eble plej multe en ĝi; ĉiu grupo, ĉiu izolita esperantisto devas oferi sian energion por varbi konstante novajn membrojn kaj tiamaniere potencigi la komunan organizaĵon, kiu post kelka tempo, ni estu certaj pri tio, atingos pli gravajn venkojn ol dum la finiĝinta laborjaro, en kiu tamen ja ne mankas ili. La kongresanoj en tiu ĉi laborkunsido, inspiritaj de altaj vidpunktoj, prezentu slajn opiniojn por diskuto kaj ke ili florigu nian estontan agadon.

Estus nepardonebla eraro forlasi ĉi tiun belan kaj ĉarmoplenan urbon, en kiu niaj Gironaj gesamideanoj tiel lerte kaj diligente organizis, venkante ĉiujn barojn, nian IX^{an}. Kongreson, ne duobligante nian laboremon por fari nian proksiman jaran feston pli interesa, pli multenombre partoprenata de federacianoj kaj pli sukcesa se eble.

Dek-du jaroj forpasis de la tago kiam nia neforgesebla Majstro surpaŝis tiun ĉi landon okaze de la V^a Universala Kongreso okazinta en Barcelona. Ke la sankta amo, kiun li vekis en nia koro, gvidu ĉiam niajn paŝojn. Ni ne forlasu la levitan standardon kaj konstante batalu por la triumfo de ESPERANTISMO.

S. ALBERICH JOFRÈ

Per forta aplaŭdo oni montris ĝian aprobon.

S-ro Claramunt legis la financon raporton, kiu ankaŭ estis aprokata.

La Sekretario legas kelkajn telegramajn salutojn de S-roj Teo Jung, eldonanto de «*Esperanto Triumfonta*»; Julio Mangada, Direktoro de «*Hispana Esperantisto*»; Frederic Pujulà i Vallès, la malnova pioniro kies pli apudan kuneston ni treege ŝatus; Delfi Dalmau, la Barcelona pedagogo; J. Comella, firma batalanto el Vich; Enric Aguadé, organizinto de la Kongreso en Reus kaj prezidinto de la antaŭa Komitato; Grupo «*Ilerda Espero*» el Lleida, us renaskiĝanta kaj la sola en tiu malproksima parto de Katalunujo.

Komenciĝis la diskutado pri la projekto de nova regularo prezentita de «*Paco kaj Amo*» kaj ĝin partoprenis multaj samideanoj. Fine la Kongreso decidis rifuzi tiun novan regularon, sed starigi reformojn sur la bazo de la regularo nun ekzistanta.

La Prezidanto petas ke oni prezentu skribajn proponojn kaj la kunsido haltas dum kvin minutoj.

S-ro Bolós en la nomo de «*Nova Sento*» proponas:

K. E. F. konsistu el individuoj kaj societoj:

1^e Kotizaĵoj estu: membro abonantoj 5 ptoj. (izolitaj membroj sen abono ne ekzistu).

2^e Membroj el Grupoj pagu ĉiumonate pere de ties grupoj ptojn. 0.05. Ĉiuj grupanoj nepre devas pagi tiun kotizaĵon.

3^e Abonantoj el grupoj pagu 4'50.

4^e Ĉiu izolita membro abonanto povas voĉdoni. Membroj el grupoj ankaŭ havas voĉdonrajton pere de la grupa delegito.

5^e La Komitato konsistu en ĝia plimulto el grupaj delegitoj.

S-ro Josep Grau petas ke oni legu la jenan proponon:

1^e Ke ĉar la Kongreso deklaris netuŝebla la nunan regularon en ĝia tuteco, la Kongreso transiru al diskuto de eventuale bonaj ŝanĝoj en detaloj administraciaj kaj de organizo.

2^e Ke la Kongreso memorante kiom malproksimaj povas resti praktiko kaj teorio, ne ekprenu uepripensitajn decidojn. (Subskribas la proponon S-roj Jacinto Bregon, Ramon Soler kaj Josep Grau).

Estas diskutataj ambaŭ proponoj dum sufiĉa tempo.

AGRABLA INTERROMPO

La diskutado estis interrompata per la eniro en la salonon de S-ro Narcís Pla i Deniel, Parlamenta Deputito de la urbo, kiun oni starante salutis per longa aplaŭdado.

La konata Parlamentano faris emocian paroladon plenan de simpatio al Esperanto kaj sin oferis por ĝia eventuala defendo en la hispana Parlamento. Li kvalifikis kiel plej idealistan nian movadon kaj diris ke nur idealismo povas savi la mondon.

Je lia foriro oni dankis per ovacio la indan Deputiton, kiu helpis la organizon de la Kongreso kaj donis gravan premion por la Floraj Ludoj.

REPreno de la Kunsido

S-ro Artur Domènech nome de «Barcelona Stelo» proponas ke oni elektu komisiitaron por diskuti la reformajn proponojn dum la nuna jaro, ke tiu komisiitaro prezentu en la venonta kongreso raporton por definitiva aprobo kaj ke la komisiitaro konsistigu la prezidantoj de ĉiuj grupoj kaj tiu de la Federacio kiel Prezidanto.

Demandite la kongresanoj aprobas.

La Sekretario legas leteron de S-ro P. Sanjuan el Valls, kiu proponas ke K. E. F. eldonu kalendarojn kun lecionoj pri Esperanto.

La kongresanoj trovas la proponon amuza kaj lasas al la komitato decidi pri la afero.

Oni esprimas la deziron sendi dankan leteron al Ateneu Enciclopèdic Popular el Barcelona pro ĝia gastamo pruvita al K. E. F. Per akلامo tion oni decidas tuj fari.

S-ro J. Bremón proponas: 1^e Ke la Kongreso gratulu la delegitojn de la 13 ŝtatoj subskribintaj la peton pri raporto prezentota al la Ligo de Nacioj kaj la celon enkonduki Esperanton en la respektivajn ŝtatojn.

2^e Sciigi la Ĝeneralan Sekretarion de la Ligo pri tio, ke K. E. F. volonte havigos al li ĉiujn detalojn pri la stato de la esperantista movado en Katalanujo; kaj

3^e Danki la ĝeneralan vicsekretarion de la Ligo, S-ron Nitobé, pro lia viva intereseemo pri Esperanto elpruvita okaze de la XIII^a.

S-ro Pellicer deziras ke oni atentigu la hispanan ministron de Publika Instruado pri tiu ĉi temo.

S-ro Campdelacreu proponas ke tiun ĉi atentigon oni sendu al la Ŝtata Ministrejo kaj S-ro P. Costa aldonas ke oni faru ĉi tiun paŝon pere de deputito S-ro Pla i Deniel, kiu dum tiu ĉi laborkunsido, salutante la kongreson, proponis sin por ĉiel helpi nian aferon.

Oni aprobas la proponojn de S-roj Bremon, Pellicer, Campdelacreu kaj Costa.

S-ro R. Soler, pro la neatendita okazintaĵo en la Praha Kongreso kaj por eviti estontajn similaĵojn, proponas ke la kongreso deklaru ke niuj delegitoj en la Universalaj Kongresoj reprezentas Katalunujon.

S-ro Josep Grau aldonas ke fakte ne plu ekzistas ia malamikeco inter S-ro Mangada kaj K. E. F. tial ke lia saluto al la kataluna kongreso estas esprimita kun frata samideaneco.

Oni aprobas unuanime.

S-ro Jaume Grau proponas ke la Kongreso esprimu al la Akademio kaj Lingva Komitato sian ĝojon kaj gratulon pro tio ke ili subtenas nian lingvan fundamenton kontraŭ danageraj deflankiĝoj.

Varma aplaŭdado pruvas ĉies konsenton.

Rekomendante ke la kongresanoj akurate ĉestu la posttagmezan kunsidon por kiu estas prokrastita la elekto de nova estraro, la Prezidanto fermas la kunsidon.

STRATO DOKTORO ZAMENHOF

Same kiel en aliaj katalunaj Kongresoj, oni intencis inaŭguri dum la nuna novan straton Doktoro Zamenhof kaj eĉ oni anoncis tion en la kongresprogramo. Malgraŭ la kora helpo de la Urbeŝtaro, lastmomente tiu intenco ne povis esti efektiva. Oni esperas venki la malfacilaĵojn post nelonge kaj tiam estos aranĝata festo por solene malkovri la tabulon de la nomŝanĝita strato.

Se tio sukcesas, ĉu ni ne povus profiti la okazon por kolekti monon por la Zamenhofa monumento, invitante al la solenaĵo ĉiujn katalunajn samideanojn? Niaj legantoj havas la parolon.

SARDANOJ ĈE «LA DEVESA»

Elirinte el la Laborkunsido, ĉiuj amase sin turnis al la «Devesa», vasta arbaro kaj belegaj ĝardenoj, unu el la plej grandaj ĉarmoj de Girona.

Tie la Cobla «Art Gironí» ludis tri sardanojn. El la rondoj de dancantoj de la sardano, la kataluna nacia danco, distingiĝis multaj kies partoprenantoj ĉiuj surportis la kongresinsignon.

Ni kredas ke nia ritmoplena danco estas iel esperantista, ĉar
 sur gracia, gaja fundamento,
 manpremanante unu la alian,
 la dancantoj faras en konsento
 unu grandan rondon familian.

FESTO DE LA OKULVITRULOJ

Jen la sola «faka kunsido» de nia Kongreso. Kvankam multnombre ĉeestata, nenia diskuto okazis. Niaj okulvitruloj interkonsentis en ĝi pace fari vermutrinkadon kaj iri tuj tagmanĝi, ĉar tempo mankis kaj la kongresa programo estis plenplena.

La Kongresejo de tiu V^a Okulvitrula Festo estis «Café Vila».

FERMA KUNSIDO

Ankaŭ ĉe «Grup Escolar», je la 4^a posttagmeze.

S-ro Gili, kiel prezidanto, prezentas S-ron E. Gastón el Aragona Esperantista Federacio, kiu salutas la Kongreson kaj oni lin akceptas per longa aplaŭdado.

La sekretario legas telegramon de S-ro F. Máñez el Cheste kaj leteron de S-ro E. Kühnl Prezidanto de VIII^ai Internaciaj Floraj Ludoj, kiu bedaŭras ne povi veni al la literatura festo. Alvenis ankaŭ skribaj salutoj de S-roj Hanns Sappl, el Graz (Aŭstrujo) kaj F. Costa, el Lisbono (Portugalujo).

La Prezidanto petas ke oni proponu samideanojn por plenumi la direktan taskon de K. E. F.

S-ro Costa Furtià proponas ke kelkaj samideanoj de la proksima Kongresurbo estu elektitaj por la komitato.

S-ro Bolós pravas ke por plej sukcesa agado estas necese ke ĉiuj komitatanoj apartenu al sama urbo.

La Prezidanto klarigas ke la laste okazinta ĝenerala kunsido decidis ke ĉiuj komitatanoj estu el sama urbo.

S-ro Costa retiras sian proponon.

Post kelkminuta halto por ebligi la ellaboron de kandidataro, S-ro Josep Grau opinias ke la ĝis nun laborinta komitato de K. E. F. trafe plenumis sian rolon kaj pro tio proponas ke ili daŭru en la posteno kaj ke estu anstataŭataj S-roj Josep Serrat kaj J. Vilaseca, kiuj ekŝiĝis, per s-roj R. Soler kaj J. Castells.

La kongresanoj akceptas tiun ĉi proponon, sed pro tio ke S-ro Alberich ne akceptas reelekton oni proponas S-ron Romà Guardiet por la sekretaria ofico. La kongresanoj unuanime aprobas la proponon.

La Prezidanto demandas kiu urbo akceptas la organizon de nia X^a kaj S-ro Albagés el Manresa, al kiu la prezidanto donas la parolon, proponas sian urbon kondiĉe ke la Komitato de K. E. F. helpos la Manresanojn en tiu ĉi tasko.

Oni promesas al li plenan helpon kaj per ekkrio, vivu kongresurbo Manresa, la kongresanoj per plej varma aplaŭdado akceptas la sindonemon de S-ro Albagés.

S-ro M. Solà skizas kiel peza estas la redaktado de gazeto kaj proponas dankon al la Redaktoro S-ro Jaume Grau, kiu sukcesis fari «Kataluna Esperantisto»n korekta kaj belstila organo de nia Federacio.

La Kongreso aklame aprobas la proponon.

S-ro Josep Grau, esprimante la deziron de ĉiuj kongresanoj, dankas grupon «Ĝerona Espero», kiu tiel zorge kaj bele organizis nian naŭan Kongreson.

La Prezidanto dankas la kongresanojn, kiuj venis el diversaj lokoj katalunaj kaj fermas la kongreson.

La strofoj de nia himno vikle sonas kiel adiaŭo al la IX^a.

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

BRILAN aspekton prezentis «Teatro Principal» momentojn antaŭ nia ravanta festo de Poezio kaj Beleco. La tuta loĝantaro de la urbo interesiĝis pri la esperantistaj Floraj Ludoj kaj ĉarmaj belulinoj, distingindaj familioj kaj scivolema popolamaso plenigis la loĝiojn, la parteron kaj la tri etaĝojn de la granda teatro.

Je la fiksita horo, eniris la Urbestro, akompanata de aliaj aŭtoritatuloj kaj urbaj eminentuloj, de la Juĝintaro kaj Konservantaro de la Floraj Ludoj, kaj oni salutis ilin per varma aplaŭdado.

Ĉe la scenejo, bele ornamita per la verdaj standardoj de la Grupoj, la aŭtoritatuloj sidiĝis maldekstre kaj la Juĝintaro dekstre de la trono pretigita por la Reĝino de la Festo.

Kiam silento fariĝis, sinjoro Urbestro prononcas la frazon: La festo komenciĝas. La Prezidanto de la Juĝintaro donas la parolon al la Sekretario S-ro Pellicer, kiu antaŭiras al tribunon kaj eklegas sian raporton.

Gesinjoroj:

Kiam la entuziasmo de kelkaj amikoj efektivigis la reorganizon de nia kara Federacio, ili tuj atentis plej zorge pri la restarigo de la literatura festo kiu sub la nomo de Floraj Ludoj estis jam okazinta plej sukcese en ĉiuj kongresoj de katalunaj esperantistoj. Tial ili nomis Juĝanton kiu devis signifi unuflanke plenan internaciecon kaj aliflanke unuigan strekon inter la esperantistoj kiujn ni povus nomi de nia unua epoko kaj la nunaj samideanoj.

Certe nur pro mia malmulta sed fervora laboro en antaŭaj tempoj estis mi proponita por la posteno de Sekretario de la nunaj Floraj Ludoj kaj tial nemeritite mi havas nun la altan honoron adresi al vi la parolon.

Jen do ni, denove, ĉe la sojlo de nia rikolta festo, ĉar fiere ni povas tiel nomi la nunjarajn Florajn Ludojn; tiel belaj kaj gravaj estas la ricevitaj verkoj.

Tiel belaj kaj gravaj ke ni nin sentis kaptitaj de dubo elektonte la verkon kies aŭtoro devus ricevi la Naturan Floron. Ĉu oni povas tranĉi senatente la plej bonodoran rozon el rozujo? Ĉu oni povas montri sammaniere la plej belbrilan koloron el ĉielarko? Same malfacila estis nia laboro ĉar inter 77 ricevitaj manuskriptoj el aŭtoroj apartenantaj al 16 malsamaj na-

cioj, oni povus ja eltiri ne unu sed diversajn verkojn indajn esti premiitaj per tiu alta premio.

Tia abundeco de bonaj originalaj versaĵoj montras al ni klare du faktojn. Unue, ke niaj Floraj Ludoj estas pli kaj pli diskonigataj inter la tutmondaj esperantistoj kaj ke nia festo meritas de la samideanaro plenan atenton; kaj due, ke la esperanta lingvo daŭrigas sian kreskadon kaj progresadon ĉar estas nedubbele ke nur perfekta aŭ perfektiganta lingvo, ĉu natura, ĉu artefarita, povas akiri gravan literaturan verkaron.

Ni ĝoju do ke senhalte aperadas en Esperanto tiaj verkoj, sed ni ne miru pro tio, ĉar same kiel al persono ŝatanta unu Belarton, plaĉas pli-malpli ĉiuj aliaj, tiel Esperanto kiu entenas idealojn de Amo, Bono kaj Paco ne povas puŝi for de si la idealojn de Beleco kaj Arto. Sen ili, lingvo estus nur perfektigita kodekso kaj neniam oni povus peti al ĝi la efektivigon de iaj iluzioj, same kiel neniu tion postulas de la malvarma uzado de kodekso A. B. C. aŭ Lieber's. Ne nur per praktikaj uzoj de nia lingvo ni alvenos al la celo!

La Floraj Ludoj estas por ni, idealistoj, nia ĉefa jarfesto. Por aliaj, pli praktikaj homoj, eble ili ne havas tiom altan signifon. Sed kiu ne ĝojos hodiaŭ kun ni ekgustumante la fruktojn de nia rikolto? Ni levu, do, la vualon de l' templo de la Poezio kaj ni eniru en ĝin por tie revii kelkajn horojn sub la ĉarmo de la liro de niaj poetoj.

Ni malkovru la nomon de la laŭreato per la Natura Floro, tiu ĝentileca kaj honora premio, kiu havigos al ni ĉiuj la ĝojon esti vasaloj de plej rava Reĝino.

Sinjoroj: Mi havas la honoron proklami S-ron **Artur Domènech Mas** kiel gajninton de la Natura Floro.

Mia koro batas plej emocie diskonigante la nomon de nia Reĝino ĉar la gajninto donis al ni ne nur gracion sed esperantistan Reĝinon. Li petis de nia samideanaro F-ino **Teresa Bartina Marull** ke ŝi bonvolu okupi nian tronon. Ŝia regado estu de ni ĉiuj kore akceptata; per laŭta aklamo, per tondra aplaŭdo ni tion al ŝi esprimu.

La laŭreato poeto, salutata per varma aplaŭdado, iras ricevi de manoj de la Prezidanto la Naturan Floron, belega florbukedo kun silka blanka rubando kun verdaj literoj; kaj tuj kune kun la poeto forlasas la scenejon la Juĝantaro kaj Aŭtoritatuloj por proponi al Ŝia Reĝina Moŝto la prezidan lokon.

Post kelkaj momentoj la ĉeestantaro per resonanta aklamo salutas la enirantan Reĝinon, kiu je brako de la poeto kaj laŭ la akordoj de solena marŝo iras sidiĝi en sia majesta trono, sekvata de sia brila Kortego de Amo, kiun konsistigas la junaj kaj belegaj fraŭlinoj **Maria Masgrau**, **Dolors de la Mano**, **Maria Risech**,

Dolors Turbau, Carme Prats, Dolors Verdaguer kaj Paquita Boris; ilin akompanas brako ĉe brako la membroj de l' Juĝintaro kaj de la Konservantaro. La hela beleco de ĉiuj Korteganinoj vekas ĉies admiron, sed ĉio estas pala antaŭ la juna majesteco de la Reĝino Fraŭlino Teresa Bartina.

Kiam Ŝi sidigis sur sia alta kaj honora trono kaj la Korteganinoj, Juĝintoj kaj Aŭtoritatuloj okupis siajn respektivajn sidlokojn, ĉesas la aplaŭdoj kaj bruo de la ĉeestantaro kaj la Sekretario alpaŝas al la tribuneno kaj per laŭta voĉo reprenas la legadon de sia raporto :

Reĝina Moŝto,
Reĝina Kortego;

Neeble estas trafi la vortojn indajn je via alta rango por dece saluti vin. Permesu ke mi klinu mian kapon antaŭ via Beleco ne pro ceremonia parado, ordinare malvarma, sed por montri al vi mian profundan dankon kaj sinceran ĝojon akcepti Vin kiel Reĝinon.

Ekscelencaj Sinjoroj,
Sinjorinoj,
Sinjoroj:

Kiel mi estas jam dirinta, distingiĝas la nunaj Floraj Ludoj per la abundeco de bonaj verkoj ricevitaj. Komprenoble, apud ili ni ricevis, kiel la antaŭajn jarojn, kelkajn manuskriptojn kies stilo montras nedubeble la novan samideanon pli naivan ol kompetenta. Sed ankaŭ en tiaj verkoj ni povas serĉi valoron, ne pro ilia literatureco sed pro la entuziasmo de iliaj aŭtoroj, entuziasmo kiu kune kun energia laboro ebligas al ili sendi al venontaj konkursoj definitivajn verkojn.

Mirinda estas la nombro de bonaj originalaj versaĵoj, kiun ni ricevis, multe pli superaj en kvalito ol la prozaĵoj. Tio ja signifas bonan paŝon antaŭen ĉar ni ĉiuj memoras ke en kelkaj el la antaŭaj konkursoj la Juĝintaro estis devigata aljuĝi la Naturan Floron al aŭtoro de tradukita versaĵo, pro la malmulta valoro de la ricevitaj originalaj versaĵoj.

Tio ne estis necesa la nunan jaron. Konkurantajn al la premio por la plej bona ama versaĵo, ni ricevis naŭ verkojn. El ili kvin almenaŭ estis ja premiindaj, sed ĉar bedaŭrinde oni nur havis unu premion por ili, la Juĝintoj estis devigataj analizi plej atente la valoron de tiuj kvin poezioj. La konkludo estis aljuĝi la premion kaj la Naturan Floron, tial ke tiu poezio superas ankaŭ la meriton de ĉiuj verkoj celantaj la aliajn ordinarajn premiojn, al la verko n-ro 72 devizita «Ruĝa Floro». Ĝi estas poezio en hispana *silva* formo kies trafa kombino de dekunusilabaj kaj sepsilabaj versoj faras agrabla kaj malpeza al orelo la tutan verkon malgraŭ ĝia longeco. La esprimoj kiujn ĝi enhavas estas riĉaj de koloro, kaj rimoj kaj ritmo estas ĉiam

IX^a Kongreso de la
Kataluna Esperantista Federacio


Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



FRAŬLINO TERESA BARTINA MARULL
Reĝino de la VIII^a Internaciaj Floraj Ludoj.




La Reĝino Fraŭlino Teresa Bartina Marull, kun siaj Korteganinoj Fraŭlinoj Maria Masgrau, Dolors de la Mano, Maria Risech, Dolors Turbau, Carme Prats, Dolors Verdaguer kaj Paquita Boris.




S-ro Artur Domènech Mas, Gajninto de la Natura Floro.




Kongresanoj ĉeestintaj la esperantan Diservon, antaŭ la pordo de Sant
Pere de Galligans.



Partoprenantoj de la ekskurso al Empúries.



Unu el la du ĉambroj kie estis instalata la Propaganda Ekspozicio.



Organizintoj de la Kongreso: S-ro G. Boris F-ino C. Maymi, S-ro C. Costal,
S-ro R. Casademont Pastro J. Casanovas kaj S-ro F. Hil.

perfektaj. Plej rimarkinda estas la tria strofo kie la penso de l' aŭtoro flugas kun evidenta facileco kaj eleganteco. La aŭtoro de tiu verko estas S-ro Artur Domènech Mas el Barcelona.

Aplaŭdo de admiro kaj simpatio eksonas kiam la premiita poeto, jam alifoje gajninta la Naturan Floron, stariĝas kaj antaŭeniras por deklami sian majstran verkon; fariĝas silento kaj S-ro Domènech legas tre klare kaj harmonie :

Al Rozo

Via nom' estas Rozo; kiel prave
 tian nomon vi rajtas, knabin' bela!
 Kiel rozo — de l' floroj, vi samrave,
 pro via ĉarmo hela,
 de l' belulinoj estas reĝin' glora;
 kiel rozflor' — belega, bonodora...

* * *

Se mi estus de roso perla guto,
 je nokto de somero,
 kvazaŭ deca al vi ĉieltributo,
 jen mi, sur vin falinte el aero,
 min kaŝus inter viaj odorplenaj
 folioj ruĝkoloraj,
 dum la horoj de l' nokt' kvietserenaj,
 dum la horoj, pro vi, parfumodoraj.
 Kun kia ĝu' mi tiam
 dolĉe ripozus en kviet silento,
 dum min dorlotuladus vi ĝis kiam
 surprizus nin la sun' de oriento
 kaj ĵaluze, ebrian je parfumo
 min vaporigus ĝia fajra lumo!

* * *

Se mi estus arĝenta papilio
 kun la flugiloj blankaj kaj graciaj,
 mi ŝtelus plian blankon al lilio
 por la flugiloj miaj,
 kaj mi ĉirkaŭflirtadus vin kokete,
 nur vin; pro tio la ceteraj floroj

ĵaluzmurmurus kun ventet' sekrete
 ĉar ne min ravas per siaj koloroj,
 ĉar nur vi estas inda
 je l' admir' mia, nur vi min altiras,
 ĉar nur vin amas mi per amo blinda,
 ĉar nur pro vi, flor' ĉarma, mi sopiras.

Kaj kiam mi jam laca
 pro la longa flirtad' serĉus kuŝlokon,
 ruĝa kuŝejo estus vi plej paca:
 brulantaj' surtenanta neĝan flokon!
 de blanko kaj purpuro l' idilio:
 sur brusto de reĝin' blanka paĝio!

* * *

Se mi najtingal' estus delikata
 kun sonora trilado melodía,
 nestejo adekvata
 estus via rozuj' por la nest' mia.

De tie miaj triloj
 jen gaje, kvazaŭ himno glora, sonus
 kiam matene fajrsimilaj briloj
 de l' naskiĝanta sun' hele vin kronus,
 jen ĝeme, kvazaŭ plorsingultoj, plendus
 kiam la nokto, sterniĝante ĉie,
 funebbron kaj mallumon sur vin sendus
 kaj nigro kovrus vin melankolie.

Per mia tril', la valo
 kaj la mont' kaj l' arbar' kaj la rivero
 sciigus pri l' amsent' de najtingalo
 kaj pleniĝus de milda ammistero;
 ĉar ĉu gaja l' kant' ĉu melankolia
 eĥus ĉiam laŭ ritm' de am' pasia.

* * *

Sed, ho ve, ne rosguto,
 nek papili' nek najtingal' mi estas.
 Por vi, reĝin', kiel vasaltributo
 nur liro mia restas:
 per ĝi laŭtiĝu mia amsekreto;
 mi nur estas poeto.

ARTUR DOMÈNECH MAS

Per ovacio oni premias la aŭtoron de tiu bela versaĵo, kaj la Sekretario daŭrigas la legadon de la raporto :

Same bela kiel la antaŭa pritraktita verko estas la n-ro 56 kun devizo «Andante». Ĝi estas verko pro kiu, nure, ĝia aŭtoro restus konsiderita kiel tre bona esperanta poeto. Nur unu malgrandan makulon ĝi enhavas, rimo aco - aĉo. La temo kiun ĝi pritraktas ne sufiĉe enkadriĝas en la konkurso por kiu la verko estis sendata kaj tial oni aljuĝas al ĝi I^{an} subpremion. Estas ĝia aŭtoro F-ino Louise Briggs, el Leeds (Anglujo).

Tre rimarkindaj estas ankaŭ la verkoj n-ro 64 devizita «Ama malkvieto» kaj n-ro 39 «Madrigalo». La unua estas karakterizata pro sia senta vereco; la dua estas bele verkita laŭ la stilo de la malnovaj hispanaj madrigaloj. Tiuj verkoj ricevas la II^{an} kaj III^{an} subpremiojn. Ilia aŭtoro estas S-ro Jaume Grau Casas, el Barcelona.

Altiris la atenton de la juĝintoj ankaŭ la verko n-ro 69 kun devizo «Nur unufoje amas la kor'». Ĝi estas poezio tre bone versigita sed ne konservas ĝis la fino la saman intensecon. Tiu verko ricevas IV^{an} subpremion. La aŭtoro estas S-ro Julio Baghy, el Budapeŝto (Hungarujo).

Estas ankoraŭ aljuĝita V^a subpremio al la manuskripto n-ro 14 kun devizo «Nubo mistera» pro ĝiaj bonaj kvalitoj, kvankam ĝi estas sufiĉe malsupera al la antaŭaj poezioj. Estas ĝia aŭtoro S-ro Norbert Berthelms el Düsseldorf (Germanujo).

Tri verkoj celis la premion difinitan al la plej bona ama verko en prozo. Du el ili -nroj. 57 kaj 38 - estis verkitaĵoj per bona Esperanto, sed la temo ne estis sufiĉe interesa. Kiel estas dirite en la verdikto, la premio estos transdonata al verko n-ro 56 kiel I^a subpremio al la originalaj amaj versaĵoj.

Nur du tradukojn de «El Misteri de la Prada» ni ricevis. Tiu fakto estis iom stranga ĉar multaj enlandaj esperantistoj estas kapablaj traduki bone la diritan poezion. Feliĉe unu el la ricevitaj verkoj estas tute korekta poezio kaj samtempe bona traduko. Ĝi estas la n-ro 9 devizita «Ni amu la pacon de l' Naturo» kaj al ĝi estas aljuĝata la premio. Estas ĝia aŭtoro S-ro **Jaume Grau Casas**, el Barcelona.

Konkuris por la premio al la traduko de «L'Escarment» ses verkoj el kiuj ni povas konsideri tri perfektaj. En ili ĉiuj la stilo estas eleganta kaj korekta kaj nur post atenta komparo de la tri tekstoj kun la originalo, la juĝintoj decidis difini la premion al n-ro 1 kun devizo «Secundum Scripturas» tial ke en ĝi pli granda nombro de katalunaj esprimoj ricevas tradukon pli trafan ol en la aliaj. Malgraŭ tio la Juĝantaro deklaras ke la merito de la tri verkoj estas preskaŭ la sama. Estas aŭtoro de la premiita verko S-ro **Josep Ventura Freixas**, el Terrassa.

Ricevas la II^{an} subpremion por sia verko n-ro 52 devizita «Sweet, sweet, sweet...» S-ro Marian Solà Montserrat, el Terrassa.

Estas aljuĝata II^a subpremio al la traduko n-ro 62 devizo «Ne ŝovu la nazon» kies aŭtoro estas S-ro S. Alberich Jofrè, el Barcelona.

Por la premio proponita de Lia Moŝto D-ro Narcís Pla i Deniel al plej bona priskribo de popola tradicio, ni ricevis naŭ verkojn. Ĝenerale la aŭtoroj pritraktis la temon tro malvarme, pli kiel ĵurnalistan raporton ol kiel literaturan pecon. Nur unu el ili, la aŭtoro de la verko n-ro 18 devizita «Individuo», sciis eviti tion kaj lia verko sub la formo de malgranda romano estas tre interesa. Bedaŭrinde, la lingvo ne ĉiam estas tute korekta.

Ankaŭ en alia verko, n-ro 65 kun devizo «Diada senyalada» estas paĝoj vervoplenaj, sed tiuj kontrastas kun aliaj malvarmaj, pure priskribaj. En ĝi estas uzata tre bonstila kaj gramatika Esperanto.

Konsiderante ke ambaŭ verkoj havas rimarkindajn kvalitojn, la unua precipe el literatura vidpunkto kaj la lasta pro la eleganta stilo uzata, la Juĝantaro decidis dividi la premion inter ili.

Aŭtoro de la verko n-ro 18 estas S-ro **J. D. Applebaum**, el Liverpoo (Britujo).

De la verko n-ro 65 rezultas aŭtoro S-ro **Marian Solà Montserrat**, el Terrassa.

Ricevas I^{an} subpremion la verko n-ro 49 kun devizo «Ne fari malbonon estas nia devo», aro de interesaj bulgaraj moroj rakontitaj korekte sed malvarme. Ĝia aŭtoro, S-ro Iv. H. Krestanoff, el Karlovo (Bulgarujo).

Sekvas en merito al tiu verko, n-ro 46 «La Majo alvenis» kaj ricevas II^{an} subpremion. Estas la aŭtoro S-ro Hans Decker, el Bergstein (Germanujo).

Tria subpremio estas aljuĝata al la verko n-ro 51 kun devizo «Aglo blanka», kolekto de tri polaj tradicioj el kiuj la lasta povus fariĝi ravanta rakonto pritraktita en literatura formo. Aŭtoro: F-ino Helena Hempel, el Lwów (Polujo).

Estas ankoraŭ difinita IV^a subpremio al la verko n-ro 3 «Ruskinano» kies aŭtoro estas S-ro Renaud Richez, el Génève (Svisujo).

Du verkoj alvenis celantaj la premion de la Grupo «Semo». Ilia lingvo ne estis sufiĉe korekta kaj la Juĝantaro decidis ne aljuĝi la premion. Tamen konsiderinte la valoron de la verko n-ro 49 kiu ricevis la I^{an} subpremion de la temo pri popolaj tradicioj, tiu premio, kun konsento de la donacinto, estas transdonata al la ĵus dirita verko.

Premio de la Grupo «Barcelona Stelo». Nur unu teatraĵeton ni ricevis kaj ĝi estas tute ne taŭga por propagandaj celoj. Tial ke, malgraŭ tio, ĝi estas tre korekta kaj bone verkita oni aljuĝas al ĝi subpremion. Aŭtoro de tiu verko n-ro 50 kun devizo «Pripensu...!» estas F-ino Helena Hempel, el Lwów (Polujo).

Tri himnoj celis la premion de la Grupo «Nova Sento», sed neniu el ili estis sufiĉe bona laŭ la juĝintoj por meriti la premion. Unu el ili, la poezio n-ro 74 «En la mondo venis nova sento» povus ĝin ricevi kiel literaturaĵo, sed pro siaj dekkvinsilabaj versoj fariĝus tro peza muzikigita. Tiu ĉi verko ricevas I^{an} subpremion. Estas ĝia aŭtoro S-ro Artur Domènech Mas, el Barcelona.

Oni aljuĝas II^{an} subpremion al la verko n-ro 48 kun devizo «Pentekost'» kies aŭtoro estas D-ro Kolomano de Kalocsay, el Budapest (Hungarujo).

Du verkoj konkuris al la premio de «Unió Deportiva». La premio estas aljuĝata al la n-ro 21 «Sunt qui cuvrículo suo...» verketo en kiu per flua Esperanto estas bone pritraktita la temo «Sporto». Aŭtoro: D-ro **Umberto Toschi**, el Bologna (Italujo).

Por la temo proponita de S-ro Casià Costal, Direktoro de la Normala Lernejo por Instruistoj, ni ricevis kvar verkojn. El ili estas tre interesaj la n-ro 22 pro sia originaleco kaj la n-ro 20 kiu traktas la aferon nur de pedagoga vidpunkto. Sed superas ĉiujn, pro la metodo kaj disvolviĝo sekvataj de l'aŭtoro, la verko n-ro 41 «Ne tentes aut perfice». La tre granda valoro de tiu verko estas ankoraŭ pliiĝata per aldono montranta la multjaran laboron de la aŭtoro pri tiaj demandoj. La Juĝantaro rekomendas plej varme la eldonadon de la verko. La gajninto estas F-ino **Emma L. Osmond**, el London (Anglujo).

Nur unu poezio celis la premion de «Ĝerona Espero». Tial ke tiu versaĵo kantas sufiĉe bone kaj per korekta stilo arbaron «La Devesa» oni aljuĝas la premion. Aŭtoro de la verko n-ro 76 «La devesa» estas S-ro **Jaume Grau Casas**, el Barcelona.

Premio de Lia Moŝta Eparĥiestro de Girona. Alvenis du raportoj por la dirita premio. Tial ke ambaŭ estas interesaj kaj verkitaĵoj per bona Esperanto la Juĝantaro decidis dividi la premion inter ili. Estas aŭtoro de la premiita verko n-ro 13 «Sub la verda stelo ni antaŭen iru» S-ro **Frederic Marti i Albanell**, el Hospitalet. Aŭtoro de la verko n-ro 17 devizita «Por Dio kaj Eklezio!» estas S-ro **Hanns Sappl**, el Graz (Aŭstrujo).

Ses tradukoj konkuris en la temo proponita de la Moŝta Katedrala Kanonikaro. El ili distingigis la n-ro 73 kun devizo «...Homar', vojiru!» kiu konservas pli ol la ceteraj la ritmon kaj signifon de la latina himno «Beata nobis gaudia», kvankam per simpla reordigo de iaj elementoj povus esti plibonigataj kelkaj versoj. Tamen ĝi estas tre bela kaj fidela traduko. Aŭtoro: S-ro **Artur Domènech Mas**, el Barcelona.

Nur unu verko aspiris al la premio de la Rektora Moŝto kaj Klaŭstro de la Tridentina Seminario. Tiu verko n-ro 27 sub devizo «Ut omnes unum», pritraktas la temon montrante veran okazintaĵon per tre alloga stilo kaj tial ĝi ricevas la premion. Aŭtoro de tiu verko estas S-ro **P. Ernst Schmitz** el Haifa, St. Charles, Palestino.

La temo proponita de «Grupo Escolar» kaj tiu de la «Unión Gremial y Patronal» restis bedaŭrinde nekonkursitaj.

Konkursis la temon de la «Instituto Géneral y Técnico» nur unu verko. En ĝi la aŭtoro studas la devenon de ĉiuj greko-latinaĵoj komenciĝantaj per litero A, kiujn enhavas la esperanta vortaro, sed, plie, estas ankaŭ studata la deveno de la plej gravaj elementoj de Esperanto, kiel prefiksoj, sufiksoj, k. t. p. La juĝintoj ne hezitas aljuĝi al ĝi la premion kaj konsilas al

la aŭtoro la finigon de la verko. Estas aŭtoro de la verko n-ro 53, devizo «Nojo» S-ro Nicola Jager, el Pisa (Italujo).

Neniun manuskripton ni ricevis celantan la premion de Lia Moŝta Provincestro, kion ni multe bedaŭras.

Mi lasis por la fino de la raporto la laŭvolajn temojn tial ke la juĝintoj estis devigataj kunigi ilin kaj fari specialan klasifikon de la ricevitaj verkoj por ebligi ilian juĝadon. Ĉiu bone komprenos ke estas ja tute neeble kompari, ekzemple, la meriton de scienca traktato kun tiu de originala versaĵo aŭ tiun ĉi kun tiu de tradukita prozo. Mi profitas tiun momenton por konsili al la organizontoj de la IX^{aj} Floraj Ludoj ke ili montru la klason de la verko kiu devas ricevi premion difinitan por laŭvolaj temoj.

La juĝintoj klasifikis la 23 ricevitajn verkojn en kvin kategorioj:

- a) Originalaj versaĵoj
- b) Originalaj prozaĵoj
- c) Tradukitaj versaĵoj
- d) Tradukitaj prozaĵoj
- e) Sciencaj verkoj

kaj aliflanke ni grupigis la premiojn laŭ la jena ordo:

- 1^a Premio de la Ekscelenca Urbestro
- 2^a Premio de «Coliseo Imperial»
- 3^a Premio de la Komerca Ĉambro
- 4^a Premio de Lia Moŝto Markizo de Camps
- 5^a Premio de la Societo «Marte»
- 6^a Premio de «Schola Orpheonica»

En la grupo a) restis klasigitaj kvin verkoj. El ili tuj distingiĝis la n-ro 68 «Sangaj larmoj» pro sia perfekteco kaj la granda emocio kiun ĝi elvokas. Ĝi estis proponata por unu el la premioj. Ankaŭ la verko n-ro 70 «Amo kreas la pacon» havas tre bonajn kvalitojn sed ĝi ne estas tiel impresa kiel la antaŭa. Oni ĝin difinas por I^a subpremio. Sekvas en merito al tiu ĉi la verko n-ro 54 «Infano» kaj II^{an} subpremion ĝi ricevas.

Ok verkoj konsistigis la grupon b) el kiuj, kvankam ne tre interesa, distingiĝas pro la spriteco kaj flueco de la lingvo la n-ro 37 «Nova Metodo». Ĝi restis, do, premiota. Alia verko n-ro 8, kun devizo «La falsa aŭ vera puritanismo de la nuna esperanta literaturo malhelpas ĝian beletristikan disvolvigon», estas tre atentinda. Estas bedaŭrinde ke la fino de la rakonto ne estas tiel interesa kiel la komenco. Tiun verkon oni mencias per I^a subpremio. Verko n-ro 60 «En sonĝo patrujon mi vidis» estas tre bela milita rakonto. La juĝintoj respektas la vidpunkton de la aŭtoro (kelkaj kunsentas persone kun li), sed malgraŭ la valoro de la verketo ili ne povas aljuĝi premion al ĝi pro iaj neoportunaj nuancoj. Ĝi ricevas II^{an} subpremion.

La grupo c) kolektis kvin tradukitajn poeziojn. La verko n-ro 10 kun devizo «Magnificat» restis nedubeble en unua vico. La Juĝantaro vere ĝojas ke tiu bela poemo estas enirinta en la esperantan literaturon sub formo tiel majstra. Alia bona traduko sed ne tiel interesa estas la verko n-ro 24 «Festina lente». Restis tiu ĉi versaĵo klasigita post la antaŭa.

Kvar verkoj formis la grupon d). La verko n-ro 66 «Nunca fuera caballero de damas tan bien servido» verkita per tre bela stilo altiris la atenton de la Juĝantaro kaj ĝi estis difinita kiel premiota verko. Alia proza traduko tre interesa, sed ne tre korekta, estas la verko n-ro 36 «Quis fuit horrendos primus qui protulit enses? Quam ferus et vere ferreus ille fruit!» Ĝi ricevas I^{an} subpremion.

En la grupon e) nur unu verkon ni enmetis. Ĝi estis la n-ro 15 «Gloron al nia Majstro!». Tiu verko estas unu el la plej gravaj kiujn ni ricevis en la nunaj Floraj Ludoj. Ĝi pritraktas, per tre pripensata maniero, la lingvajn respondojn de D-ro Zamenhof kaj montras la profundan studon kiun faris pri ili la aŭtoro. La Juĝantaro povus nur montri kun malaprobo la uzon de ĝis nun neoficiala sufikso «enda».

Estis jam juĝitaj ĉiuj verkoj celantaj la premiojn por laŭvolaj temoj. Ni konsideris tiam ke el la kvin premiataj verkoj de la koncernaj grupoj, plej ŝatinda estas la n-ro 15 al kiu oni destinis la premion de la Ekscelenca Urbestro. Ĝia aŭtoro estas S-ro Walter Lippmann, el Zwenkau (Germanujo).

Sekvis en merito verko n-ro 68 kaj ĝi ricevas la premion de «Coliseo Imperial». Estas la aŭtoro S-ro Julio Baghy, el Budapeŝt (Hungarujo).

Verko n-ro 70 kiu ricevas la I^{an} subpremion estas ankaŭ verkita de S-ro Julio Baghy, el Budapeŝt.

Aŭtoro de la verko n-ro 54 ricevinta II^{an} subpremion estas S-ro Nicola Jager, el Pisa (Italujo).

Estas aljuĝata la premio de la Komerca Ĉambro al la verko n-ro 10. Rezultis esti ĝia aŭtoro F-ino Louise Briggs, Leeds (Britujo).

Mi reparolos poste pri la subpremiata verko n-ro 24.

La premion de Lia Moŝto Markizo de Camps oni aljuĝas al la verko n-ro 66 kies aŭtoro estas S-ro Marian Solà Montserrat, el Terrassa.

Ricevas I^{an} subpremion la verko n-ro 36. Ĝia aŭtoro estas S-ro Luigi Puppo, el Genova (Italujo).

Estas aljuĝata la premio de la Societo «Marte» al la verko n-ro 37. Aŭtoro: S-ro Paulo Balkányi, el Budapeŝt (Hungarujo).

Unuan subpremion oni aljuĝas al la verko n-ro 8 kies aŭtoro estas S-ro Renaud Richez el Génève (Svisujo).

Al la verko n-ro 60 estas aljuĝata II^a subpremion. Aŭtoro: S-ino Maria Elworthy-Posenaer, el Mariaburg-Eckeren (Belgujo).

Tial ke restis ankoraŭ aljuĝota la premio de «Schola Orpheonica» la Juĝantaro decidis ĝin doni al la plej merita el la subpremiataj verkoj de ĉiuj grupoj de laŭvolaj temoj. Tia verko estas laŭ opinio de la juĝintoj la n-ro 24

kaj ricevas la diritan premion. Estas la gajninto: **S-ro Paulo Medem**, el Kovno (Litovujo).

Jen, gesinjoroj, la rezultato de niaj nunjaraj Floraj Ludoj. Tiuj literaturaj festoj certe havos atentindan gravecon en la evoluado de nia lingvo, tial ke ili instigos la samideanojn verki en arta formo per Esperanto. Mi diris evoluadon, sed, kompreneble, mi ne volis paroli pri gramatikaj ŝanĝoj dirante tion. Mi nur aludis la evoluadon de la stilo. Neniu povas diri kiel estos la venonta esperanta stilo, kiu certe ne estos la lasta, ĉar ĉiu vivanta lingvo kaj precipe juna, freŝa lingvo kiel la nia, evoluas senhalte tra la centjaroj kaj neniam estas ellaborita. Ni lasu, do, ke ekstergramatike, supergramatike, montriĝu tiu vivsigno de nia lingvo kaj ni ne baru tian vojon.

Sed rilate la versfaradon, ni opinias ke estas jam tempo ke niaj lingvaj institucioj regulu la aferon. Ni ne katenigu la inspiron de niaj poetoj per feraj ringoj, sed ni sciu bone kio estas aŭ ne korekta. Ĉu oni povas versi esperante per la liberaj hispanaj ritmoj aŭ ĉu oni devas sekvi, ekzemple, la pli mallarĝajn regulojn de la germana lingvo? Ĉu nur perfektajn rimojn oni povas akcepti aŭ ĉu oni povas enkonduki la radikajn kaj asonancajn rimojn? Jen kelkaj el la demandoj kiuj sin prezentas al internacia juĝantaro dum la tralegado de la konkursantaj verkoj. Ĉiu juĝanto juĝas la versaĵojn laŭ la reguloj de sia patra lingvo kaj estus preferinde tion fari laŭ oficialaj esperantaj reguloj. Oni konkretigu ilin kaj ni ne timu ke ili malhelpos la kreskadon de tiu branĉo de nia literaturo; kontraŭe ili donos solidan bazon kaj novan forton por ke la esperanta poezio, nia iama cindrulino, iĝu ĉiam pli bela, pli rava kaj pli glora.

ESTANISLAU PELLICER

Unu post la alia la premiitaj aŭtoroj aŭ iliaj reprezentantoj iris ricevi de manoj de la Reĝino siajn premiojn meze de ĝeneralaj aplaŭdoj. La versaĵoj estis preskaŭ ĉiuj legataj kaj la ĉeestantoj, el kiuj multaj ne estis esperantistaj, entuziasme aplaŭdis ilin kun miro pri nia sonora kaj harmonia lingvo. La premiojn gajnitajn de eksterlandaj samideaninoj iris ricevi fraŭlinoj esperantistaj kaj la bela poezio de F-ino Louise Briggs «Revelacio de Amo» estis milde legata de F-ino Teresa Colls, el Girona.

Je la fino de la raporto de S-ro Pellicer, oni gratulis lin per longedaŭra aplaŭdado pro lia bona plenumo de la ofico de Sekretario de la Floraj Ludoj.

Anstataŭ la Prezidanto S-ro Kühnl, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti, parolis por fini la feston S-ro Josep Grau, membro de la Juĝantaro, kiu tre bele kaj elokvente klarigis per kataluna lingvo

la celon kaj signifon de la esperantistaj Floraj Ludoj. Kelkfoje interrompis lian belan paroladon bruaj aplaŭdoj de la publiko, en kiu kaŭzis fortan impreson la varmaj esprimoj, plenaj de esperanta fervoro, de la eminenta parolanto.

Jen pala resumo pri la parolado farita de S-ro Josep Grau, anstataŭante la Prezidanton de la VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj:

Reĝina Moŝto,
Ekscelencaj Aŭtoritatuloj,
Gesamideanoj,
Ĝironcivitanoj:

Via grandara ĉeesto en la nuna festo de la esperantistaj Floraj Ludoj, kiu estas la plej hela ĝia briligo, atestas al ni la grandan intereson kiun ve-
kis en la nobla popolo de Girona nia ideo kaj nia propagando.

Por danki vin mi prefere klarigos al vi ĉiuj, kia estas la celo de la Internaciaj Floraj Ludoj, kaj kial la Kataluna Federacio, kiu jam okfoje ilin okazigis, konsideras ilin kiel la ĉefan elmontron kaj la plej efikan manifestadon de siaj ĉiujaraj kongresoj.

En nia spirito estas ĉiam vivanta la rememoro pri la efiko de la katalunlingvaj Floraj Ludoj, kies unuaj paŝoj estis rigardataj kun ekridemo de tiu sama popolo kiu post duonjarcento ŝuldas al ili la plenan revivigon, la realtigon de sia lingvo; kaj tia rememoro estas la kaŭzo kial ni, esperantistoj kaj katalunoj, atendas de niaj internaciaj Floraj Ludoj, en kiuj la kulturado de la lingvo estas farata en la plej altaj kampoj de la intelekto kaj de la spirito, ke ili havos la povon venki la eblan ekridemon de la indiferentularo, kiun certe ni timas neniel, kaj kiun ni forte pravaj kuraĝas moki.

En niaj Floraj Ludoj montriĝas ĉiuforte, ke ne nur la interkompreno lingva inter la esperantistoj de tre apartigitaj landoj estas absoluta, sed ankaŭ ke niaj poetoj trovas en la fleksebleco kaj admirinda belsoneco de Esperanto la esprimilon plej akuratan, kiu povas, tra la interspaco kaj super la lingvaj limoj kaj diverseco de popolaj moroj, vibrigi niajn korojn akorde kun la sentoj de Poezio, kiuj al ni katalunoj sonas mirige kaj kortuŝe, tiel same kiel la verkoj de niaj naciaj poetoj, sentitaj kaj esprimitaj tra nia natura lingvo. Kaj tio okazas — konsideru tion, se vi volas, kiel veran miraklon — ĉar en la esperanta internacia lingvo povas resonori tiel same kiel en la kataluna lingvo la klasikaj kaj ĉiam vivaj agordoj grekaj kaj latinaj.

Ke ni estas sur la bona vojo, atestas klare la rezultato de la en tiu ĉi momento okazantaj Floraj Ludoj. En la areno ilia, luktis por la premioj multenombraj verkistoj de 16 malsamaj lingvoj aŭ nacioj; kaj la Juĝantaro, kiu trastudis kaj atente esploris la prezentitan verkaron, konsistis ankaŭ el samideanoj de diversaj landoj; tri el ili estas katalunoj, unu estas hispano ne kataluna, alia, la Prezidanto kiun mi havas la honoron anstataŭi, estas

bohemo, kaj alia el la juĝantoj estas germano. Ni ĉiuj ĝuis la belaĵojn de la premiitaj verkoj, kelkajn el kiuj vi ĵus aŭdis, kun tia sento de admiro kun tia ravata impresado kiel se la legataj verkoj estus verkita en la respektiva patra lingvo.

Ĉu vi imagas kian grandan forton ni povas ĉerpi en tiu spiriton altiganta konstato? Ni tial kredas ke se la Floraj Ludoj katalunlingvaj povis, venkinte rapide la unuamomentajn ekridojn, reentronigi la malnovan katalunan patran lingvon, nur tial ke ĝi parolis rekte al la koroj ĝin forgesintaj, la internaciaj esperantlingvaj Floraj Ludoj kondukos al la starigo de la nova interpopola lingvo tial ke ĝi katenigas la malproksimajn korojn per mildaj ligiloj, ne imageblaj de tiu ne kredanta ankoraŭ je la diverslingva interkompreno.

Via promesoplana juneco, bela Reĝino kaj ĉarmaj Korteganinoj, samideaninoj niaj; via protekto kaj aprobo, respektindaj aŭtoritatuloj; via atento kaj scivolemo, popolo de la senmorta urbo; via konstanteco kaj entuziasmo, karaj gesamideanoj kiuj kuu mi estas feliĉaj ĝui tiujn ravantajn momentojn, kuraĝigas nin tiel, ke, eĉ se ni povus ekdubi iam pri la efiko de la ĉefe spirita valoro de nia ideo, ni povus retrovi en via kunesto la apogon por restarigi la unu momenton eksanceliĝintan entuziasmon nian.

Vi, samideanoj, tion bone komprenas kaj en la profundo de l' koro sentas.

Vi, neesperantistoj, tion povos facile konstati, se via aprobo nuna transformiĝos per malgranda peno en samideana kunlaborado.

Venu do al ni kaj grandigu ĉirkaŭ la mondo la serenon kaj fratan rondon de la kredantoj je Amo, en kies unua rango klopodas rajte staradi la partianoj de Esperanto.

JOSEP GRAU CASAS

Ovacio aŭdiĝas post la prezidanta parolado, kaj sinjoro Urbestro prononcas la ritan frazon: La festo estas finita.

La Reĝino kaj la Ama Kortego forlasas la scenejon, kaj la samideanaro adiaŭas ilin per longa aplaŭdado kaj kantado de « La Espero », kies emociaj strofoj vibras kune kun ĉiuj koroj, hele kronante la ĉarman poezian feston.

Ĝi estis plej efika pruvo pri la taŭgeco kaj beleco de Esperanto kaj ĝia propagando valoro estis nekalkulebla.

Ĉiuj enurbanoj longe rememoros tre agrable tiun esperantan feston, kiu neantaŭvidite montris al ili per ravanta maniero la tutan signifon de nia alta kaj nobla celo.

Oni bone rimarkis la partoprenon de multaj eksterlandaj konkursantoj, kio estas aparte kontentiga por ni, ĉar per tio montriĝas klare ke ni sukcesis igi plene internaciaj la Florajn Ludojn

kaj espereble en venontaj jaroj kreskos ankoraŭ la nombro de alilandaj partoprenantoj.

Vivu la Internaciaj Floraj Ludoj!

OFICIALA FESTENO

Je la 9^a vespere ĝi okazis en la ĝardeno de « Hotel del Comerç », partoprenata de pli ol cent gesamideanoj.

Sidis en la honora prezida loko la Reĝino de la Floraj Ludoj kaj ŝiaj Korteganinoj, akompanataj de la premiita poeto kaj de aliaj esperantaj eminentuloj.

Ĉe la ĉampano, oni faris multajn jen seriozajn, jen gajajn kaj spritajn tostojn, kun komentarioj kaj bondeziroj pri la esperantista movado kaj pri la organizado de niaj ĉarmaj Kongresoj, dum kiuj ĉiuj vivas tiel ĝojajn horojn.

HONORA BALO

Tiuj — mirige tre multaj — ne laciĝintaj ankoraŭ pro la longa festaro de la Kongreso, ĉeestis post la festeno la balon ĉe Teatre Principal, dediĉatan al la Kongresanoj de « Centre de Dependents de Comerç » kaj « Unió Detallista », kiu daŭris ĝis la morgaŭa frumateno.

LUNDO, 17

POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ

Du postkongresaj ekskursoj estis organizitaj kaj ambaŭ altiris la ĉeeston de multaj gesamideanoj, ĉefe tiu al Empúries kaj La Escala.

Per du specialaj aŭtomobiloj oni veturis al Empúries. Tie oni vizitis tre atente la grekajn ruinojn, pri kiuj donis detalajn klarigojn esperantlingve Pastro Casanovas. Ankaŭ faris tion katalune la gvidanto de la elfosaĵoj S-ro Gandia, kiu bonvolis akompani la esperantistojn dum parto de la vizito. Fine estis vizitata la Muzeo kie oni konservas la tre valorajn objektojn eltrovitajn.

De tie la ekskursantoj piede iris al la belega kaj pentrinda vi-

laĝo La Escala, kie oni vizitis la tre interesan preĝejon. La ceteran tempon la samideanoj agrable promenis apud la maro, kiu plej bele montriĝas en tiu regiono.

La ekskursantoj al Banyoles ankaŭ ĝuis belan spektaklon, vizitante la tiean lagon kaj ĉirkaŭaĵojn.

Je la 7^a vespere ĉiuj estis revenintaj en Girona kaj la afablega loka samideanaro volis akompani ilin al la stacidomo, kie okazis emocia adiaŭo kun ekkrioj «Vivu Esperanto» kaj «Ĝis la venonta en Manresa».

RESUMO

Nia nunjara Kongreso estis vere sukcesa kaj inda je la antaŭaj. La urbo ĝojis pro tiom da festoj kaj solenaĵoj kaj ĝenerale ĉiuj enurbanoj elmontris sian simpatian al Esperanto. Tion oni povis ĉefe rimarki dum la festo de la Floraj Ludoj, kiu havis tiun ĉi jaron specialan reliefon. La granda flago esperantista pendantsanta antaŭ la urbdomo kaj la standardoj de la Grupoj ornamantaj ĝiajn balkonojn, la miloj da ĉiuspecaj presaĵoj, invitiloj, programoj kaj murafiŝoj redaktitaj parte en Esperanto, kaj la multnombraj insignoj de la Kongresanoj, kiujn oni senĉese vidis ĉie en la urbo, atestis klare pri la okazo de granda festo esperantista kaj pruvis la ekziston de intensa mondlingva movado en nia lando.

La ĉeesto de honorindaj aŭtoritatuloj kaj eminentaj personoj, kaj la favora sinteno de la ĵurnaloj, havis en tiu ĉi Kongreso atentindan valoron.

La nombro de Kongresanoj, pli ol 250, estas kuraĝiga signo de nia esperanta revigliĝo. La nombro de reprezentitaj societoj estis ankaŭ grava. Ni esperu pro tiu Kongreso novan plifortiĝon!

Raportojn pri ĝi publikigis la ĵurnaloj, ĉefe tiuj de Girona kaj Barcelona. «El Dia Gráfico» bonvolis aperigi grandajn kaj belajn gravuraĵojn pri la diversaj festoj, kun portretoj de la Reĝino kaj Korteganinoj de la Floraj Ludoj. Ankaŭ sur la ĉiusemajna ĵurnalo «Esperanto Triumfonta» aperis raporto pri la kongreso, kun vidaĵoj de Girona, portreto de la Reĝino kaj la poezio premiita per la Natura Floro.

Ni finos dankante ĉiujn kiuj helpis al nia sukceso, sed ĉefe la

membrojn de la Kongresa Komitato kaj tute speciale ĝian Prezidanton D-ron Casanovas.

La IX^a Kongreso okazis kaj la unua jaro de la revivigo de K. E. F. estas finiĝanta. Ke la nova jaro alportu progresojn al ĝi kaj la X^a Kongreso en Manresa novan entuziasmon. Vivu la Kataluna Esperantista Federacio!



Oficiala Parto

La federaciaĵoj elektitaj de la Kongreso por la nova Direkta Komitato kunsidis kaj la postenoj restis disdonitaj jene : Prezidanto: Joan Gili Norta; Vic-prezidanto: Joan Amades; Sekretario: Romà Guardiet; Vic-sekretario: Jaume Claramunt; Administristo: Pere Navas; Kasisto: Joan Castells; Voĉdonantoj: Enric Adam, Jaume Grau, Ramon Soler, Jaume Pruna.

La D. K. decidis starigi, laŭ la regularo, kelkajn Sekciojn kaj elektis por ili la jenajn membrojn :

Sekcio por propagandaj vizitoj :

S-roj Ramon Soler, Komitatano; Domingo Bruguera; Joan Castells Jaume Claramunt; Artur Domènech; Francesc Piñol.

Sekcio por propagando sur la ĵurnaloj :

S-roj Jaume Grau, Komitatano; Jacinto Bremón; Delfi Dalmau; Conrad Domènech; Romà Guardiet; Marian Solà.

Eldona sekcio :

S-roj Joan Amades, Komitatano; Enric Aguadé; S, Alberich Jofrè; Joan Comadran; Fraŭlino Carme Maymí; Estanislau Pellicer.

La Konsulta Komitato, konsistanta el la prezidantoj de ĉiuj Grupoj kaj tiu de K. E. F., ankaŭ kunvenis kaj decidis regule kunsidi ĉiumonate, la duan dimanĉon je la 10^a kaj duono matene, en la sidejo de K. E. F., por plej bone plenumi sian taskon, ĉefe tiun al ĝi komisiitan de la lasta Kongreso rilate la studadon pri eblaj konvenaj ŝanĝoj en nia Regularo.

La Prezidantoj de la Grupoj bonvolu, do, fari atenton al ĉi tiu alvoko.

ROMÀ GUARDIET, SEKRETARIO

La Revelacio de Amo

«Ne proksimiĝu, ho popolo mia:
 atendu ĝis montriĝos volo dia!»
 Vizaĝojn kaŝis la popol' kaŭranta
 antaŭ la sankta monto flambrulanta.
 Jen tondro, fulmo, tera konvulsio,
 sub la pied' de nevidebla Dio:
 kaj tra la nuboj, kvazaŭ trumpetsono,
 «Vi amu Dion!» venis la ordono,
 «Al ĉiu obeant' fariĝos ĉia bono.»

Ho, ĉu ebligas vera kora amo
 al nevidato nur pro la proklamo?
 La homoj Dion timis, sed ne amis,
 kvankam l' ordonon oni laŭtaklamis
 en ĉiu hejmo, templo, sinagogo.
 Instruis tion ĉiu pedagogo;
 sed tute male pri la proksimulo —
 «Denton pro dent', okulon pro okulo!»
 Por hom' la dia am' restadis nur formulo.

Sed tamen ĉie regis am' natura,
 en la patrinoj sindonema, pura,
 en la geedzoj varma, primitiva,
 en la infanoj simpla kaj naŭva,
 en la junuloj arda kaj flamanta,
 en la maljunuloj milda kaj konstanta,
 en la amikoj firma, simpatia,
 en multaj koroj forte energia:
 ateston faris homa am' pri amo dia.

Sed kiam, post la tempo difinita,
 en Betlehemo estis jam naskita
 la glora Fil' de Dio kiel homo —
 Ĉiam laŭdata estu Lia Nomo —
 kaj kiam, sur la monto Kalvario,
 pro homoj krucumiĝis Homo-Dio,
 ho! tiam eldoniĝis la proklamo,
 la granda vero — «Dio estas Amo,
 hieraŭ kaj hodiaŭ kaj por ĉiam Samo.»

Ho Am', juvel' plej bela en palaco!
 Ho Am', donanta lumon al domaĉo!
 Tra mia kor' trasendu la radion,
 ke mi eksentu dolĉan simpation,
 afablan paciencon, pardonemon,
 gajecon kuraĝigan, kaj servemon:
 ĉar tiuj estas la idaro bela
 de vi, ho adorinda Am' ĉiela!
 Min gvidu per la lumo via pura, hela!

LOUISE BRIGGS

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



Al la Konservantaro de la Floraj Ludoj

Ĉar ne povis kunveni en Girona dum la Kongreso la membroj de la Konservantaro de la Floraj Ludoj, t. e., ĉiuj membroj de la antaŭaj Juĝantaroj, oni sciigas ilin ke la 15^{an} de Decembro okazos kunveno ĉe la sidejo de K. E. F., je la 10^a vespere, por elekti la Juĝantaron de la proksimaj IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj. La eksterurbaj membroj povos sendi skribe sian opinion.

LA SEKRETARIO

Bibliografio

KASĤITAJ VORTOJ. — Originele skribitaj en araba lingvo de «La Plejsupera Plumo» de Baha' U' Llah. El la angla lingvo tradukis Vašily J. Erošenko kun helpo de Agnes B. Aleksandro. Japanujo.

24 - paĝa verko kun kovriloj, bindita laŭ la japana maniero. Ĝi enhavas 72 religiajn pensojn.

KASĤITAJ VORTOJ. — Japana traduko de la sama antaŭa verko, kun esperanta aldono «Dek-du Fundamentaj Bahaj Principoj».

LA KARTLUDO PRO SUPERA SILEZIO, de Prof. Walter Stahlberg. Adresata de la rifuĝintoj el Supera Silezio al la tutmonda Esperantistaro.

Berlin 1921. Nova Esperanto-Eldonejo. Prezo: 3 M. 24 - paĝa broŝuro.

PROTESTKUNVENO kontraŭ la perforto al Supera Silezio, la 22^{an} de Majo 1921, en la granda salono de «Philharmonie», Berlin. Nova Esperanto-Eldonejo. Prezo: 3 M. 32 - paĝa broŝuro.

POR NEDIVIDITA GERMANA SUPERA SILEZIO! — Alparolo de Gerhart Hauptmann. Berlin 1921. Nova Esperanto-Eldonejo. Prezo: 3 M. 32 - paĝa broŝuro.

KIEL ONI FONDAS KAJ ORGANIZAS ESPERANTAN GRUPON? — Kun aldono de Statutoj por esperantaj Grupoj. Verkis: Hans Sappl. Paulus-Eldonejo, Karmeliterplatz, 5, Graz, Aŭstrujo. 28 - paĝa broŝuro kun trafikaj konsiloj pri la organizo kaj funkciado de Grupoj.

DUA EKZERKARO DE ESPERANTO KUN ITALA TRADUKO. — 32 - paĝa broŝuro el la Kolekto de la Revuo «L'Esperanto», enhavanta la Duan Ekzerkaron de D-ro Zamenhof kun la traduko en itala lingvo. Eldonis: A. Paolet. S. Vito al Tagliamento (Italujo). Prezo: 1 L.

UNUA KAJERO. — (Nova Tempo - Libretaro) Aŭstria kolekto de tegindaj rakontetoj, fabloj k. t. p. Eldonejo Nova Tempo, Mollardgasse N-ro 55 Wien, VI. Prezo: 30 Kr.

Broŝuro 32 - paĝa, kun multaj interesaj rakontoj en tre korekta Esperanto. — J. G. C.



En la venonta jaro ni publikigos la ĉefajn verkojn premiitajn en la lastaj Internaciaj Floraj Ludoj.

Baldaŭ aperos

LA ROMANO DE MENDE NARR

originala romano de J. D. Applebaum, kaj la poemo

ROBERTO, REĜO DE SICILIO

el Longfellow, tradukita de Louise Briggs.



Presejo J. Vinyals, Plaça Constitució, 6 : SARRIÀ

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto	Nova Tempo
Le Monde Espérantiste	Literaturo
Esperanto-Praktiko	Bulgara Esperantisto
Belga Esperantisto	La Patrie Ladine
La Marto	The British Esperantist
La Semisto	Nederlanda Esperanto
Germana Esperantisto	La Verda Ombro
Hispana Esperantisto	Amerika Esperantisto
Katolika Mondo	Espero Teozofia
Esperantista Laboristo	L'Esperanto
Kristana Espero	La Revuo Orienta
Verda Utopio	Arguso
Vegetarano	Brazila Esperantisto
Esperanta Finnlando	Oficiala Gazeto Esperantista
La Esperantisto	Ĉeĥoslovaka Gazeto
La Laborista Esperantisto	Nova Eŭropo
Nova Tagiĝo	La XIII ^a
Hungara Esperantisto	Agitanto
Esperanto Triumfonta	Bizantio

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

A V Í S

En compliment de la nostra promesa, hem fet aparèixer «Kataluna Esperantisto» durant aquest any amb absoluta regularitat.

Esperem que tots els federats, corresponent als nostres esforços, voldran pagar sense cap ajornament la quota de l'any 1922, car això es la millor garantia de la puntual publicació de la Revista i facilita en general la bona marxa en l'ordre econòmic de nostra volguda «Federació Catalana d'Esperantistes».



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Printempa Foiro 1922 de la 5^a ĝis 11^a de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27^a de aŭgusto ĝis 2^a de septembro

La centra merkato por la internacia
komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝejn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

(Foiroficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)